



Estrara Komunikilo EKO 2018-21 sendita el Budapeŝto, la 11an de septembro.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la al kroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

AMO-UA okazos post la unuafoja AMO-RO

Post la jubilea 50a AMO-seminario okazinta kadre de la 103a Universala Kongreso, sekvas du pliaj deciditaj AMO-seminarioj ĝis la jarfino. AMO 51 signalas la unuan seminarion en Rumanio. Ĝi okazos dum unu mateno kadre de la Nacia Kongreso de la landa asocio de UEA, Esperanto-Asocio de Rumanio (EAR). Ĝi identos kun novspeca programo por tiu lando: Kleriga Duontago. La modelo ne estas precize la similnoma UK-programero), ĉar kontribuado estas aktive serĉata de iu ajn kongresano, ankaŭ plene novaj membroj – ekzemple tiuj allogitaj post fino de la kurso en Duolingo. AMO-50 sekve okazos tra kvar horoj en la mateno de dimanĉo, la 16an de septembro.

1. Stefan MacGill (Hungario) - AMO, la projekto 'spronteamoj', la nova kotizsistemo.
2. Stier Gabriela (Satu Mare) – Poŝtkrucigo,
3. Mariana Berariu (Gherla) – Interesaj faktoj pri Rumanio
4. Cătălin Văduva (București) – Interreta Eo-kurso rumanlingve kaj la retpaĝaro de la asocio
5. Aurora Bute (Timișoara) – E-kongresoj – fenestroj al la mondo
6. Bodale (Suceava) - Kion mi povas fari por Esperanto en Rumanio
7. Oldřich FISCHER (Ĉeĥio) – Libeloj
8. Adriana Dolca (Timișoara) - La reĝo Karolo la Unua
9. Mihaela Dolca (Timișoara) - La muta malapero de la insektoj
10. Mihai Trifoi (Bixad) - Pri la rumana popola kulturo
11. Birta Alexandru (Satu Mare) - Kelkaj novaĵoj pri la transplantado de homaj organoj
12. Doina Popa (Timișoara) – Fado, la portugala trezoro.



Videblas, ke ne temas rekte pri trejnado, sed la programo valoras por konstati, kiel eblas uzi Esperanton por klerigado, kaj kiel meĥanismo por doni voĉojn aal novaj esperantistoj.

Vizitu la retpaĝon de EAR: esperanto.romania.ro. (vidu la bildon)

La 52a AMO-seminario portos la programon al plia nova lando en la regiono: Ukrainio. Tio okazos inter la 19 kaj la 21a de oktobro en la renoma urbo Lviv kun la temo "Movada Fortigo en Sud-Orienta Europo"

UMEA vidigas sin inter kuracistoj

Aperis sufiĉe ampleksa artikolo en angla lingvo pri UMEA en la *World Medical Journal*, revuo de la monda medicina asocio WMA:

<https://lab.arstubiedriba.lv/WMJ/vol64/august-2018/#page=32>

Ni sukcesis samtempe ekspliki Esperanton, menci la meritojn de UEA kaj la UNESKO-rezolucion de Montevideo, Amikumu, kaj varbi por la Medicina Internacia Revuo..

Kompreneble raporto pri faka medicina agado en Esperantujo havas perfektan lokon en la revuo de la Monda Medicina Asocio, WMA.



EKO maloftiĝos

Kiel vi jam konstatis, la EKO-komunikoj aperas malpli intense. Unuafoje en kvar jaroj ne aperis komunikoj el la Universala Kongreso. Ŝanĝoj en la programaro uzata por la pretigo enkondukis “bonigojn”, kiuj nete malhelpas – kredeble sekve de la novaj reguloj de EEU. Feliĉe la ofteco de Gazetaraj Komunikoj intensiĝas – kaj ajna persono rajtas peti al la CO por esti aldonita al la sendolisto.

Ni bedaŭras – sed jen la realeco.

=====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento nun tute ĝisdata ĝis 2018-14. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj, klingonuloj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.